

RECIMinfo

Bulteno de *Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo*, numero 04, januaro 2007, 2 €

KUN SENPERA SUBTENNO DE LA MONDA POPOLO

Ĉiam, ĉiuj oligarkioj, ĉu teokrataj, ĉu demokrataj, agas same, kunigante siajn proprajn suverenecojn, neniam delegante iun parton profite al supera organismo kapabla, kun senpera popola subtenno, garantii pacon.

Nuntempe, ju pli potenca estas iu naciŝtato, des pli ĝi ŝarĝas sin per " internaciaj devigoj ", des pli ĝi emas krei kaj plifortigi blokon kun satelitaj nacioj, kiujn ĝi strebas superregi. Ankaŭ la naciŝtatoj malpli potencaj strebas por defendi siajn politikajn kaj ekonomiajn utilojn, superregi malpli fortikajn. Tiel stariĝas, fakte, malfirma monda hierarkio de nacioj.

La internaciaj kunvenoj, ĉe la ministra nivelo kie traktiĝas decidoj devigantaj ŝtatanaciojn mem, povas nenion kontraŭ la mankoj de la nuna mondorganizado. Nu, ŝanĝi tute kaj subite ĉi tiun estas neeble, tial ĉar ĉiuj naciaj estraroj estas samtempe gardistoj kaj kaptitoj de la sistemo.

Sed konstituigi, paŝon post paŝo, novan sistemon, apud la malnova, **tio ja estas ebla**. Tiel disvolviĝas plej ofte la homaj evoluoj. La malnovo ne malaperas subite, kiam la novo prezentiĝas. Ĉu temas pri mekanismo, ĉu pri metodo, ĉiam la malnova kaj la nova ekzistas flankon ĉe flanko dum kelka tempo.

En tiu numero :

Kun la Monda popolo.....	p. 1
Eĥoj el Bohicon (Benino).....	p. 2
Unueco kaj diverseco	p. 2
Kronologio de tutmondismo kaj de monda civitaneco	
(4 paĝoj)	p. 3 ĝis 6
Mallongaĵoj	p. 7
Deklaro de IKTAM/CILAME pri Ĉernobilo	p. 7
Alvoko por kontribuoj	p. 8
Kongreso de la Popoloj : ALVOKO al KANDIDATIĜO.....	p. 8

Balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj

2007 : parta renovigo de unu triono el la elektitoj, t.e. 15 Deleĝitoj.

En tiu balotelekto estos alvokitaj por baloti la elektantaro « A », t.e.

- ◆ ĉiuj mondcivitanoj enregistritaj ekde 1998 ;
- ◆ unu triono el la plej fruaj civitanoj de la mondo.

La elektontoj ricevos la balotajn dokumentojn per poŝto kaj povos sendi sian balotilon en speciala koverto sen afranko.

La voĉnombrado okazos la 22an de septembro 2007.

En 2010 okazos la parta renovigo de la dua triono de la elektitoj fare de la elektantaro « B », t.e. ĉiuj novaj civitanoj de la mondo enregistritaj inter 2007 kaj 2010 kaj dua triono el la plej fruaj mondcivitanoj. En 2013 okazos la parta renovigo de la tria triono de la elektitoj fare de la elektantaro « C », konsistanta el la novaj registritoj inter 2010 kaj 2013 kaj la tria triono el la plej fruaj.

La novaj faktoj de nia epoko estas : la disvolviĝo de la tekniko, la plivastigo de konscio pri homa solidareco kaj mondcivitaneco.

Fronte al la ripetitaj fiaskoj de la ŝtatanacioj, **nova metodo devas estis prilaborita**. Necesas rigardi nulaj ĉiujn pasintajn agojn, kaj studi novan eblan iom-post-ioman reprezentadon de la loĝantoj de la planedo, cele al administrado de ĝiaj komunaj aferoj. La nova organizaĵo devas esti starigita iom post iom, per stadioj, kaj kunekzisti, tiom longe kiom necese, apud la malnova. La Kongreso de la Popoloj povas tion fari, sin ŝarĝante ekde nun pri taskoj laŭ sia mezuro.

Alfred Rodriĝuès-Brent.

*Eltiraĵo de la enkonduko al la libro
Kongreso de la Popoloj*

La **KONGRESO DE LA POPOLOJ**, establita laŭpaŝe de 1969, estas la unua organo de transnacia demokratio : pli ol 100.000 balotintoj el 120 landoj. Ĝi malfermas la vojon al Monda konstitucianta asembleo, taskita per la starigo de monda juro kaj de institucioj kapablaj certigi la pluvivon de la biosfero kaj de la homaro.

SEMINARIO DE TUTMONDISTAJ STUDOJ EN BOHICON, BENINO,

La 6an, 7an kaj 8an de oktobro 2006

Sukcesis !

Memorinda inaŭguro kun la ĉeesto de la departementa Prefekto kaj de reprezentanto de la ŝtata registaro, televido kaj ĵurnaloj. 38 partoprenantoj, kiuj venis el Benino, Togolando kaj Ganao, por pripensi el la komunikajhoj faritaj de kvar intervenantoj : du afrikanoj kaj du eŭropanoj. Bona etoso, bonega organizado, rimarkinda efikeco.

Kompleta protokolo estas havebla laŭ simpla peto je la adreso de la bulteno, same kiel per Interreto :

? <http://www.recim.org/ascop/pr06-eo.htm>

La profesoroj
Azilino kaj
Gbegnonvi



REKOMENDOJ

Konsiderante la celojn de la Mondcivitanoj, konduki komunuan lukton por la organizado de la paco kaj de la sekureco fondita sur mondaj institucioj ;

Konsiderante la ĉefan prizorgadon de ĉiu nuna homo, kiu estas inviti kaj estigi ideojn kaj instituciojn kapablajn efike stariĝi kontraŭ la minacoj, kiuj amasiĝas en tiu komenciĝanta 21a jarcento ;

Konsiderante la plagojn, kiuj nun premas sur la homa specio, nome : misnutrado, poluado de medio, akaparado kaj malŝparado de la krudaj materialoj kaj riĉofontoj, senbremsa demografio ;

La partoprenantoj de la Seminario de Tutmondistaj Studoj rekomendas : Al ASKOP kaj al la Kongreso de la Popoloj, ke :

- ◆ ASKOP kaj la Kongreso de la Popoloj laboru por la instituciigo de la monda civitaneco ;
- ◆ ASKOP kaj la Kongreso de la Popoloj sin devontigu organizi kaj helpi la agadojn de klerigado kaj de informado al la Civitanoj de la Mondo ;

ASKOP kaj la Kongreso de la Popoloj sin devontigu en :

- ◆ pledado ĉe la aŭtoritatuloj por la aliĝo al la koncepto de monda civitaneco ;
- ◆ klerigado pri la monda civitaneco al la loĝantaroj ;
- ◆ pledado ĉe la registaroj por justa divido de la riĉaĵoj taŭga kun la monda civitaneco ;
- ◆ serĉado de mekanismoj por la financado de la lokaj strukturoj de la monda civitaneco ;
- ◆ pledado ĉe la internaciaj organizaĵoj, inkluzive de UN, por la antaŭenpuŝo de la monda civitaneco ; la kulturo de demokratio kiel vivmaniero je loka, regiona kaj internacia niveloj.

Al la landaj, regionaj kaj internaciaj organizaĵoj, ke :

- ◆ la landaj, regionaj kaj internaciaj organizaĵoj aliĝu al la koncepto de monda civitaneco ;
- ◆ ĉi lastaj organizaĵoj sin devontigu antaŭenpuŝi la mondan civitancon ;
- ◆ ĉi lastaj organizaĵoj alportu sian helpon (organizan, materian kaj financon) al la strukturoj de la monda civitaneco.

Al la aŭtoritatuloj, ke :

- ◆ la politika-administraj aŭtoritatuloj de Benino, de la landoj de la Afrika regionparto, de Afriko kaj de la Mondo aliĝu al la koncepto de monda civitaneco ;
- ◆ ĉi lastaj registaroj alportu siajn helpojn (administran, materian kaj financon) al la strukturoj de monda civitaneco ;
- ◆ ĉi lastaj registaroj laboru por justa divido de la riĉaĵoj taŭga kun monda civitaneco por malpliigo de la mizero ;
- ◆ ĉi lastaj registaroj sin devontigu ankoraŭ pli en la kulturon de demokratio kiel vivmaniero.

La Seminario

UNUECO KAJ DIVERSECO

Registrolibro de la Mondcivitanoj fondiĝis en 1949 por ke estu enskribitaj ĉiuj, kiuj rekonas sin membroj de la monda komunumo, kaj kiuj per tiu ago manifestas sian volon, ke la mondo sin provizu per mondaj demokrataj institucioj. Tiuj enregistritaj mond-civitanoj konsistigas la « tutmondan elektantaron ». Konsekvence la Registrolibro de la Mondcivitanoj partoprenas en la transnaciaj mondaj balotelektoj por la starigo de institucioj, kiuj bezonas la rajtecon de la civitana voĉdonado.

Tra la mondo ekzistas multaj tutmondistaj organizaĵoj. Ili estas liberaj asocioj, en kiuj partoprenas ĉiuj mond-civitanoj, kiuj deziras tion, ĉu enregistritaj ĉu ne.

Registrolibro de la Mondcivitanoj agnoskas tiujn tutmondistajn asociojn, aŭ pli ĝuste : Registrolibro de la Mondcivitanoj agnoskas al ĉiuj enregistritaj mond-civitanoj la rajton agi en asocio. Ni eĉ aldonu, ke temas pri respondeco, devo de ĉiu mond-civitano sin devontigi en la elektitan agadon por partopreni en la konstruado de la demokratio kaj paca mondo, kiun ni volas. Fakte demokratio konsistas ne nur el voĉdono dum balotado, sed el partopreno de ĉiu en la organizado de nia monda komunumo, en la defendo de la homa afero, kaj en la antaŭgardo de nia vivmedio : la tero.

Ni opinias, ke tiuj asocioj malavare agadas ĉiu en sia propra medio, laŭ sia fako, sia sento kaj siaj elektoj por evoluigi la konsciencan de la loĝantaroj al la neceseco de monda demokratio. Kaj en tiu senco, ni estas favoraj al la plimultiĝo de la mond-civitanaj iniciatoj, al la plimultiĝo de la asocioj tra la mondo por prepari la universalan konsciencan al la komenciĝo de politika tutmondiĝo, fine kapabla reguligi la ekonomian tutmondiĝon, fine kapabla protekti la dignon de ĉiu homo, kaj antaŭgardi la vivmedion.

Ĉar Registrolibro de la Mondcivitanoj agnoskas ĉiujn tutmondistajn asociojn, ĝi provas starigi rilatojn kun ĉiuj, dank'al la helpo de la mond-civitanoj, kiuj partoprenas en ili. Tiuj rilatoj povas esti punktaj kunlaboroj (por okazaĵo, kongreso, balotado) aŭ longdaŭraj rilatoj. Ni povos sukcesi nur per unuigo kaj organizante niajn fortojn tra la planedo kaj laŭ niaj fakoj.

Ni ankoraŭ aldonu, ke Registrolibro de la Mondcivitanoj ne sin deklaras pri la temoj, kiuj fundamentas la nunan tutmondistan debaton : nek por nek kontraŭ UN nek por nek kontraŭ la proponoj aŭ la deklaroj de iu aŭ tiu organizaĵo. Ni nur proklamas, ke la mondaj problemoj devas ricevi mondajn solvojn venontajn de la tutmonda demokratio. La cetero apartenas al la debato, kiu devas okazi en ĉiuj tutmondistaj asocioj kaj kolektivoj. Kaj ĉio devos iam manifestiĝi per elektoj faritaj de la voĉdonantoj dum ĝeneralaj mondaj balotadoj.

Daniel Durand



KRONOLOGIO de TUTMONDISMO kaj de MONDA CIVITANECO

1919

La Ligo de Nacioj (LdN) estas internacia organizaĵo enkondukita de la traktato de Versajlo en 1919 cele al la savo de la paco en Eŭropo. Sidanta en Ĝenevo, en la palaco Wilson, kaj poste en la Palaco de la Nacioj, ĝi estas anstataŭita en 1945 de Unuiĝinta Naciario. Ĝi ne plenumas sian kompletan rolon antaŭ la dua mondmilito.

La ĉefa iniciatinto de LdN estas la Usona prezidento WOORROW Wilson. Laŭ lia analizo de la unua mondmilito, la sekreta diplomatio estas la ĉefa kialo kaj la Ligo de Nacioj devas malsukcesigi ĝin. La 14a punkto de Wilson konsistigas la bazon de tiu asocio de nacioj. Tamen la usona Senato, rifuzante la ratifadon de la Versajla traktato, balotas kontraŭ la aliĝo al la Ligo de Nacioj kaj Usono neniam partoprenos. Inter la du mondmilitoj, Sovetio kaj la nazia Germanio kaj ankaŭ Japanio (en 1933) eksigās el LdN.

1924

La usonanino Lola M. LLOYD kaj la hungaranino Rosika SHWIMMER proponas planon por monda konstitucia Asembleo, kies membroj estus rekte elektitaj de la popoloj de la tuta mondo por redakti mondan konstitucion.

4an de decembro 1937

La usonanino Lola M. LLOYD kaj la hungaranino Rosika SHWIMMER fondas en Ĉikago la *Kampanjon por Monda Registaro*. "Campaign for World Government".

1938, Novembre

Kreado en Britio de la *Federala Unuiĝo* "Federal Union". En 1939 Federala Unuiĝo fiksas sian sidejon en Usono. Poste Federala Unuiĝo fariĝos "Asocio por unuigi la demokratiojn" "Association to Unite the Democracies"

1940

Kreado en Svisio de « Svisa Popola Movado por Federacio de la Popoloj ».

En 1945

Usono : la Komitato por la antaŭenpuŝo de monda konstitucio kunvenas en la universitato de Ĉikago kaj skizas la grandajn liniojn de monda konstitucio.

1946 , Februare

Robert Sarrazac fondas kun du amikoj la « Centron de Esploradoj kaj de Tutmondisma Esprimo » samtempe kiel malgranda reto de dudeko da kamaradoj : « La Homa Fronto de la Civitanoj de la Mondo ».

1946 :

La brita deputito Henry USBORNE, reprenante la ideojn de Lola Lloyd kaj Rosika Schwimmer (Konstitucia Asembleo de la Popoloj) taskis al si mem kunvoki ĝin. Popola movado : *Kampanjo por monda registaro* "Crusade for World Government" subtenos la britajn parlamentanojn kunigitajn kun USBORNE.

13a ĝis 16a de oktobro 1946

La « Internaciaj Federaciistoj » kunvenas en Luksemburgo kaj adoptas la nomon « Movado por Monda Federacia Registaro ».

En 1947

Usono : Kvin malgravaj federaciistaj organizaĵoj kunvenas en Asheville (Norda Karolino) kaj interkonsentas konsistigi sin kiel « Unuiĝo de la Mondaj Federaciistoj ».

17a ĝis 24a de aŭgusto 1947

Svisio : 51 organizaĵoj kunvenas en Montreux kaj fondas la Universalan Movadon por Monda Konfederacio.

En 1954 la nomo de la asocio ŝanĝiĝis en « Universala Movado por Monda Federacia Registaro », en angla : «World Movement for World Federal Government» ĝis 1956. Poste ĝi transformiĝis en «World Association for World Federation» (W.A.W.F.) - Universalan Movado por Monda Federacio (MMF), poste en Movado de Mondaj Federaciistoj (20a kongreso, 1987).

La Movado de Mondaj Federaciistoj celas doti la internaciajn instituciojn per demokrata politika aŭtoritato por prizorgi la problemojn, kiuj estas trakteblaj nur je monda nivelo, tamen agnoskante la suverenecon de la ŝtatoj en certaj kampoj de interna politiko ». La movado laboras por la plifortigo de UN kaj ties demokratiigo, por politika reguligo de ekonomio je monda nivelo kaj por la konstitucio de grandaj « regionaj federacioj », kiel stadio al monda federacio.

25an de majo 1948 :

Gary DAVIS, Usona piloto de la dua mondmilito, forlasas sian usonan ŝtatanecan kaj petas la protektadon de UN.

5a ĝis 11a de septembro 1948 :

2a konferenco de Luksemburgo. En la tagordo : revizio de la ĉarto de Unuiĝinta Naciario. Kreado de la Internacia Gvid-Komitato taskita kunordigi ĉiujn agadojn al Konstitucia Asembleo.

19an de novembro 1948

En Parizo, Palaco de Chaillot, sidejo de Unuiĝinta Naciario, Robert Sarrazac kaj Gary Davis interrompas la Ĝeneralan Asembleon de Unuiĝinta Naciario por depostuli la demokratiigon kaj la supernaciecon de UN.

9an de decembro 1948

En Parizo, en la vintra ciklodromo, pli ol 17 000 homoj partoprenas en kunveno, dum kiu estas legita la respondo de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝinta Naciario al letero sendita de la Parizaj Civitanoj de la Mondo : « UN ne ekzistas por aranĝi pacon, sed por gardi ĝin kiam la ŝtatoj estos organizinta ĝin ».

10an de decembro 1948

En Parizo UN adoptas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj.

La 28a artikolo precizigas, ke :

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

1an de januaro 1949 :

La Sekretariato de la Civitanoj de la Mondo decidis sin strukturi kaj krei Registrolibron de la Civitanoj de la Mondo. La anonco pri tio estas farita la 1an de januaro de Gary Davis. La statuto estis oficialigita la 27an de julio 1949.

En 2007, la « Mondcivitana Registrolibro » estas oficiale reprezentita de pli ol 50 Korespondantoj aŭ Registrocentroj en 40 landoj.

5an de aprilo 1949

La ŝtato Tenesio (Usono) laŭ iniciato de la advokato Fyke FARMER, adoptas leĝon organizantan oficialajn balotelektojn al la Konstitucianta Asembleo de la Popoloj. Tiuj ĉi okazis la 3an de aŭgusto 1950. 3 deputitoj, el kiuj FARMER, estis elektitaj, po unu por unu miliono da balotintoj.

Tiu balotelekta leĝo estos deklarita nevalida en 1952 de usona justica kortumo.

24an de junio 1949

CAHORS ĉefurbo de la franca departemento Lot, sin deklaras mondcivitana urbo.

Tiu unua « tutmondiĝo » estis la komenciĝo de vasta movado, kiu koncernis ĉirkaŭ 960 urbojn, komunumojn, departementojn, regionojn kaj eĉ unu ŝtaton en 13 landoj. Ĉirkaŭ duono de la provincoj de Japanio adoptis tutmondiĝajn deklariojn. En 1966 Monda Konsilantaro por la Tutmondiĝo estis kreita de la Universala Movado de la Mondaj Federaciistoj kaj ĝia sidejo situas en Japanio en Hiroŝimo.

Tiu movado daŭras, la lasta tutmondiĝinta urbo estas la komunumo Kashusha (Sud-Kivuto, Kongio) la 25an de julio 2006.

<http://www.recim.org/dem/mondurboj.htm>

24an kaj 25an de junio 1950

CAHORS. Por festi la unuan datrevenon de la tutmondiĝo de la urbo granda kunveno arigis pli ol 5 000 homojn (la kvazaŭ tuta



tiama loĝantaro) apud la historia ponto Valentré.

Tiuj tagoj restos – kio ajn okazus – markitaj en la historio de Lot, de Francio ... kaj eĉ de la Mondo. Flagoj kun mondaj koloroj flirtis sur kelkaj publikaj konstruaĵoj apud la trikolora flago. La ĝojega homamaso staris ĉe la urbodomo por religie aŭskulti la Nobel-premiiton pri Paco 1949, Lord BOYD ORR, fondinto en UN de ONA (Organizaĵo por Nutrado kaj



Agrikulturo), kiu venis el sia malproksima Skotlando. La ponto Valentré estis la fono de unu el la plej fruaj spektakloj « Sonoj kaj lumoj ». Mi eĉ aranĝis la muzikan programon : la unua movado de la unua simfonio de Beethoven e k s p l o d i s k i e l piroteknikaĵo ... Poste ĉiuj, akompanataj de la eksterlandaj delegacioj, uzis la « Mondan Vojon n-ro 1 ». Sur la altaĵoj la kamparanoj estis bruligintaj grandegajn Sanktjohanajn fajrojn. Atingante la prilumitan mezepokan urbeton Saint-

Cirq-Lapopie, André Breton, kiu mem partoprenis, frapigis pro la superreala etoso (...)

Intervjuo kun la D-ro Louis Sauvé.

<http://www.recim.org/dem/lot.htm>

26an de decembro 1950

Malfermo en Ĝenevo de la Monda Konstitucianta Asembleo, kun la partopreno de delegitoj el 27 landoj (inter kiuj la 3 deputitoj el Tenesio). Tiu kunveno finiĝos meze de januaro 1951 per malsukceso pro konstato de nesufiĉa reprezenta rajteco.

24a ĝis 29a de septembro 1951

Konferenco de Londono : kreado de la Universala Asocio de la Parlamentanoj por Monda Registaro. Tiu asocio, iniciatita de Henry USBORNE, arigis 800 parlamentanojn el 10 landoj (en 1967). En Danio, 98 % de la deputitoj sin deklaris tutmondistoj.

Periodo 1951-1957

La Universala Movado de la Mondaj Federaciistoj, kiuj en la komenco ricevis la apogon de Lord BOYD ORR, Nobelpremiito pri paco 1949, de Lord ATTLEE, de Jean LECANUET, de Thor HEYERDHAL ..., estos submetita de la kongreso de Romo (1951) ĝis la kongreso de Hago (1957) sub la forta prezidanteco de la norvega Hjalmar RIISER-LARSEN. La kvietiginta entuziasmo, la milito en Koreo kaj la malvarma milito, la « Mac-Carthysmo » en Usono, la Sueza afero en 1956, la tendenco nete minimalista (t.e. favora al simpla reformo de UN) de MMF, estos la ĉefaj kialoj de la senspiriĝo de la tutmondismo kaj ĉefe de MMF, kies membraro malkreskas. La Civitanoj de la Mondo, pli « maksimalistoj » rifuzos grupiĝi kun MMF.

1954

Garry Davis fondas « World Service Authority » sendependa entrepreno pri civila stato.

29an de marto 1955

Prezentado de la plano « NEPTUNO » en la brita ministerio de la eksterlandaj aferoj (celo : internaciigo de la oceanoj, maraj fundoj kaj de Antarktiko).

La saman tagon, la franca ministro Edgar FAURE prezentas planon por utiligi la monsumojn liberigotajn de universala malarmado por helpo al la subevoluintaj landoj.

25an de novembro 1956

Unuafoje en la historio, internacia polica forto intervenas : la « blukaskuloj » instalas siajn poziciojn en Egiptio, post la franca-brita ekspedicio sur la Suezan kanalon.

1957

Kun siaj amikoj Maurice COZYN, belga pacisto, kaj Jacques SAVARY, franca pentristo kaj poeto (kiu estos en 1965 la verkanto de la Alvoko de la 13), A.RODRIGUES-BRENT prezentas al la Internacia Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo la projekton de KONGRESO DE LA POPOLOJ.

1959 Junie

Kreado de la DENVERA GRUPO, (Kolorado – Usono) : *Monda Komitato por Monda Konstitucio* (World Committee for a World Constitutional Convention), animata en la komenco de Philip ISELY, kiu kunvenon post kunveno (Ĝenevo, Milano...) neniam ĉesos agadi por konstitucianta asembleo kaj eĉ sukcesos kunvenigi Mondan Parlamenton de la Popoloj en Interlaken (Svisio) kaj Wolfach en 1968.

La nomo ŝanĝiĝis : Asocio por Monda Parlamento kaj Konstitucio. La « parlamento » estas nomita « Provizora Monda Parlamento ». Temas pri kunelektita parlamento (ne balotelektita). La 9a sesio de tiu « parlamento » okazis en Tripoli (Libio) en majo 2006.

22an de aprilo 1960

Komuna deklaro de Britio, Francio, Kanado, Usono kaj Italio, en la konferenco de Ĝenevo, laŭ kiu ili estus pretaj akcepti mondan registaron.

11an de aprilo 1963

Encikliko de la papo Johano XXIII : "Pacem in Terris"

23an de majo 1963

En Bruselo, Maurice COSYN organizas kongreson, el kiu rezultos la Komitato por la Kongreso de la Popoloj (kies Ĝenerala Sekretario estos RODRIGUES-BRENT).

1965 (?)

Fondado de la Asocio de la Civitanoj de la Mondo en Sanfrancisko (Usono). AWC laboras por malarmado, monda demokratio kaj plifortigo de UN. AWC kunlaboris dum proksimume 30 jaroj kun Mondcivitana Registrolibro.

<http://www.worldcitizens.org>

3an de marto 1966

Dek tri monde famaj personoj lanĉas la « ALVOKON DE LA DEK-TRI ». Laŭlonge de la jaro 1966 tiu teksto estos represita de diversaj ĵurnaloj en multaj landoj.

15an de novembro 1968

Kunveno de 3000 homoj en la ĉambrego « Mutualité » en Parizo, organizita de la franca Registrocentro de la Civitanoj de la Mondo por lanĉi la unuan transnacion balotelekton en la homara historio. Sur la tribuno :

Josué DE CASTRO, S-ino NEHRU, Jean ROSTAND, ĉe Alfred KASTLER, Louis LECOIN, Clara CANDIANI, Léonide MOGUY, RODRIGUES-BRENT, Guy MARCHAND, Théodore MONOD ...

3a de marto ĝis 7a de junio 1969

Unua transnacia balotelekto en la homara historio : ĝi estas la unua parto de elektado al la Kongreso de la Popoloj. 10.000

enskribitoj el 87 landoj. Estas elektitaj Jeanne HASLE (Francio) kaj Josué DE CASTRO (Brazilo).

La sekvaj balotelektoj okazos en 1971, 1973, 1975, 1977, 1980, 1984, 1987, 1994 kaj 1998.

El ĉiu balotelekto 2 elektitaj Delegitoj kaj 2 anstataŭaj Delegitoj de 10000 balotelektantoj. Sume 20 titolaj Delegitoj kaj 20 anstataŭaj Delegitoj.

Notinde, ke tiu balotelekta maniero nun estas kaduka (vd. Ĉi poste en oktobro 2003).

22an de aprilo 1970

Unua Tago de la Tero, en Usono, laŭ iniciato de la demokrata Senatano de la ŝtato Viskonsino GAYLORD Nelson. 20 milionoj da homoj respondis al lia alvoko. Okazanta la 22an de aprilo jam de 36 jaroj, la Tago de la Tero fariĝis monda en 1990. Nun 500 milionoj da homoj, en 184 landoj, partoprenas ĉiun jaron en la festo de la planedo.

10an de decembro 1970

Nova granda kunveno de la Civitanoj de la Mondo : 3.000 homoj en « Mutualité ». Temo : UN kaj la homaj rajtoj.

17an de decembro 1970

Rezolucio 2749 de UN, kiu dekretis la marajn fundojn KOMUNA HEREDAĴO DE LA HOMARO.

1972, marte

Kreado de Monda Helpe-Korpuso.

En 1971, terura ciklona cunamo ruinigas la Orientan Pakistanon (nuna Bangladeŝo), kaj estigas pli ol 100 000 mortoj.

Clara CANDIANI, Abato PIERRE, Michel CEPPEDE, Gilbert CESBRON, Théodore MONOD, Alfred KASTLER, Robert BURON... decidis krei konstantan korpuson da volontaj savistoj specialigitaj pri la helpoj okaze de natura katastrofo, kun la celo savi la homajn vivojn kaj helpi la sinistritajn loĝantarojn en la mondo.

UN : Kreado de UNDRO (Oficejo de la Kunordiganto de UN por la helpoj okaze de katastrofo) taskita mobilizi kaj kunordigi la helpojn provizitajn de diversaj organizaĵoj, kiel ONA, Monda Organizaĵo por la Sano, UNICEF, ...

1975

Sub la prezidanteco de la Rektoro Robert MALLET :

- Kreado de MURS (Universala Movado de la Scienca Respondeco).

- Konsistigo de Konstanta Tutmondista Komitato.

7an de julio 1977

Efektiva ekfunkciado de la KONGRESO DE LA POPOLOJ, proklamita en universitato Sorbonne (Parizo)

1977

Kreado de « Internacia Urĝa Agado » far la teamo de urĝeco de Internacia Civila Servo.

www.aui-ong.org

En julio 1977, la Kongreso de la Popoloj aprobis ambaŭ help-organizaĵojn : Monda Helpe-Korpuso kaj Internacia Urĝa Agado.

10an de marto 1982

Kreado de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato.

Tiu kreado estis farita laŭ la propono de la komisiono « Malsato, disvolviĝo kaj tutmondismo » de la franca

Registrocentro de la Civitanoj de la Mondo. Ĝi respondis al la alvoko entenata en la deklaro n-ro 6 de la Kongreso de la Popoloj. Tiu asocio konformas al tutmondisma kaj mutualisma klopodado.

Inter la foraj celoj, oni trovas la kreadon de monda imposto de solidareco, kaj la antaŭenpuŝo de agado ĉe la ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, por ke ili konsentu la transdonojn de suvereneco necesajn al la kreado de vera Monda Instituto de Solidareco.

En aŭgusto 2004, la nomo ŝanĝiĝis en MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO.

Aprobite de la Kongreso de la Popoloj en septembro 1982 (Plena kunsido de Brighthon).

En 2007, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato havas 1500 membrojn en 34 landoj.

? <http://www.globidar.org>

22a ĝis 30a de julio 1983

Unuaj Mondaj Pacludoj, aranĝitaj en Bellegarde sur Valserine (Francio).

La Mondaj Pacludoj estas renkontoj humanaj, sportaj, kulturaj kaj ekonomiaj malfermitaj al ĉiuj homoj de nia mondo, sen iu ajn distingo.

Organizitaj laŭ kategorioj de aĝo, en la sportaj fakoj plej proksimaj al la naturo, la Mondaj Pacludoj celas instigi la loĝantarojn praktiki fizikan kaj sportan aktivecon por :

- Lukti kontraŭ la malbonfaroj de la grandaj malsanoj de niaj senmovemaj civilizacioj.
- Krei amikajn ligojn inter partoprenantoj kaj tiamaniere favorigi la interkomprenon, la toleremon inter homoj kaj popoloj por servi la estontan PACON.

La Mondaj Pacludoj, konfirmante sian kredon en la humanaj principoj de la nuna sporta movado, estas nova modaleco por organizi internaciajn sportajn konkursojn.

La estontaj Mondaj Pacludoj estos aranĝitaj en Loreno de la 22a de aŭgusto ĝis la 3a de septembro 2007.

<http://perso.orange.fr/jeu.mondiaü.de.la.paix/>

23a ĝis la 26a de aprilo 1990

Tours (Francio). Kongreso de tutmondismo "La iĝanta Mondo".

4 tagoj dediĉitaj al paco, evoluigo, medio kaj demokratio – 40 intervenantoj el 13 landoj antaŭ suma publiko de 800 homoj.

12a ĝis 16a de majo 1990

Plena kunsido de Kongreso de la Popoloj en Ĝenevo. 19 Delegitoj el 36. Renkonto kun la adjunkta ĝenerala direktoro de UN por depostuli la kreadon de popola parlamenta ĉambro.

1991

Kreado de Internacia Konsilio por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio – IKTAM/CILAME

<http://www.recim.org/cilame/>

2000, decembre

La Civita Montessori Lernejo (Lucknow, Hindio) kunvokas la 1an Internacian Konferencon de la Justicestroj.

Kelkaj landaj konstitucioj rajtigas la justicon ŝanĝi leĝon, kiam tiu ĉi estas kontraŭa al la intereso de la homaro.

<http://www.cmseeducation.org/article51/index.htm>

25a ĝis 27a oktobro 2003

Plena kunsido de la Kongreso de la Popoloj.

La Kongreso de la Popoloj bilancas tutmondismojn kaj la agadojn ligitajn al ĝia ekzistado. Ĝi proponas la kreadon de Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj, en kiu povus kunlabori ĉiuj tutmondistaj organizaĵoj. Ĝi modifas la balotektan regularon de Kongreso de la Popoloj.

<http://www.recim.org/kdp>

2004, januare

Dum la Monda Sociala Forumo en Bombajo (Hindio), kreado de la Koalicio por monda parlamento kaj monda demokratio.

1, 2 et 3 oktobro 2004

Kunveno en la Domo de la Mondcivitaneco en Mulhuzo (Francio).

Kvindeko da homoj el 12 tutmondistaj organizaĵoj fondas la Konsultan Asembleon ĉe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP). ASKOP nun entenas 33 organizaĵojn, el kiuj 27 el 14 landoj kaj 6 transnaciaj.

4an de marto 2006

La Kongreso de la Popoloj kreas la « Juran servon de registrado ». Tiu servo estas destinita al la komunumoj kaj organizaĵoj, kiuj deziras evolui ekster la ŝtataj kadroj tamen sin apogante sur la demokrata rajteco devenanta de mondaj transnaciaj balotelektoj al asembleo kun supernacia destino. La kreado de tiu jura servo de registrado estas la fundamento de ekaperanta monda civila juro.

<http://www.recim.org/civil/>

6a ĝis 8a de oktobro 2006

Unua Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon (Benino), aranĝita de BCEBI/CBDIBA, benina organizaĵo membro de ASKOP. 40 partoprenantoj el 4 ŝtatanecoj. La seminario, aranĝita laŭ la regularoj de ASKOP, pli aparte konsideris la afrikan historion kaj la kontribuojn de Afriko al la demokratio en la mondo kaj al monda demokratio.

www.recim.org/ascop/pr06-eo.htm



En Bohicon, apud la « arbo de Monda Unueco », John Agbeli, togolanda membro de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.

Tiuj 4 paĝoj de historia sintezo estas la rezulto de laboroj sinsekve realigitaj de Guy Marchand, Claude Tellier, Henri Cinaud kaj Daniel Durand
Antaŭdankon pro viaj reagoj.



Tutmondisto honorita de UNESKO

La 21an de septembro 2006 la granda aŭditorio de UNESKO tutpleniĝis por honori la juĝiston **Kristoforo Weeramantry**. Tiu Srilankano, eksa juĝisto de la Justica kortumo en Hago ricevis la **UNESKO-premion de la pac-edukado**. La dono de tiu

premio estis la okazo aŭskulti prelegon de la profesorino Mireille Delmas-Marty, kiu detale priskribis la demandojn, kiujn la mondo devas fari al si, kaj kiu montris la necesan vojon de la planedskala demokratio. Kristoforo Weeramantry estis prezentita al tiu premio de la Civita Montessori Lernejo (CMS) en Lucknow (Hindio), kiu mem gajnis tiun premion antaŭ kelkaj jaroj.



TUTMONDIĜOJ

KASHUSHA : la 25an de julio 2006, tiu kampara komunumo situanta apud Bukavu (Sud-Kivuto, Kongio) deklaris sin monda teritorio ligita al la tutmonda komunumo. Tiu deklaro okazis sur la bazo de la kutima ĉarto, sed la komunumo opiniis bone, aldoni al ĝi konvencion pri la homaj rajtoj. En tiu regiono, kie la homaj rajtoj estas ĉiutage malrespektataj, tiu ago estas kuraĝa, profeta kaj emfazinda.

? Tutmondiĝa komitato de Kashusha, BP 490 Cyangugu, Ruando.

Civita Montessori Lernejo (CMS) : dum solena kaj signifoplena ceremonio, la 11an de decembro 2006 D-ino Bharti Gandhi, kiu sin esprimis je la nomo de la 31.000 lernantoj kaj studentoj de la **CMS-Lucknow** al S-ino Liliane Metz-Krencker, legis la tutmondiĝan ĉarton per kiu la lernejo deklaris sin « monda teritorio ».

? CMS, Station Road 12, IN 226 001 LUCKNOW, Hindio.

Du novaj Mondcivitanaj Registrocentroj

Hispanio : Dank'al la instigo de Fernando Elena Diaz kaj kun la helpo de Angel Lopez de Torre kaj Ana Saldana Fernandez estis kreita la « Reto de la Civitanoj de la Mondo ».

? Red Ciudadanos del Mundo, c/.Herradura, 58 Bajo, ES 45200 ILLESCAS, Espagne

Benino : Patrice Lovesse, Marc Deguenon kaj Janvier Tossou fondis la Beninan Centron de la Mondcivitanaj (CEBECIM), kaj ankaŭ institucion, kiu kunlaboros : la Fondaĵo Lovesse por la pacedukado (FOLEP).

? CEBECIM, BP 252, BOHICON, Bénin



CILAME / IKTAM

Okaze de la dudekjariĝo de la eksplodo de la atomcentralo de Ĉernobilo, la Internacia Komitato por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio, IKTAM, rememorigis tiun pozicion :

Protektado kontraŭ la radioaktiveco.

Nia monda vivmedio estas tro ofte grave kaj multfoje atakata. Tiuj multaj atakoj forte zorgigas IKTAM kaj la civitanojn de la mondo. Ili tre energie reagas kontraŭ la nocivo de la radioaktiveco de kiu ajn deveno. IKTAM konsciencas pri la urĝa neceseco mobilizi siajn aktivajn fortojn por partopreni en la ellaborado de solvo de tiu problemo. Ĉernobilo perfekte ilustras la specon de katastrofo, kiu povas denove okazi. La terura eksplodo de la centralo inside ellasis ĉirkaŭen grandegan kvanton da radioaktiveco. Ĝi dissemas nekuraĉeblajn venenajn malsanojn : nepra konsekvenco : morto.

Konsciante pri tiu pereiga danĝero IKTAM agadas ankaŭ por la elradikigo de netolereblaj agresoj kontraŭ la vivmedio. Ĝi laboras pri tio ekde 1990. Konstatinte la grandan nombron de agresoj faritaj kontraŭ la planeda vivmedio IKTAM reagis proponante la kreadon de monda aŭtoritato pri medio provizita per realaj povoj de plenumado, de kontrolo kaj laŭbezono de trudodevigo por elimini la deliktajn agojn de la poluantoj. Ĝis nun ili agadas senpune, ĉar ekzistas neniu demokrata institucio kapabla sankcii kiam estas danĝero por la monda vivmedio.

Ĉiu civitano de nia planedo estas koncernata pro la savo de la medio, nepra neceso de nia civilizacio.

? CILAME, 142 avenue de Versailles, 75016 PARIS.



ASKOP

La Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj nun nombras 36 organizaĵojn (kompleta listo sur Interreto aŭ laŭ simple peto al la adreso de tiu bulteno). La nunaj projektoj :

- ◆ Seminarioj de Tutmondistaj Studoj nun preparataj en Accra (Ganao), Bukavu (Kongio), kaj eble Sofio (Bulgario).
- ◆ Mondaj Pacludoj
- ◆ Ĝenerala kunveno de ASKOP la 3an kaj 4an de novembro 2007.

www.recim.org/ascop/



Mondcivitana Registrolibro denove ĉe UNESKO

Post la forpaso de Guy Marchand, en 1993, plu neniu estis libera por reprezenti Mondcivitanan Registrolibron ĉe UNESKO. Nun la funkcio estas plenumata dank'al S-ino Hermine Togbe. La rilatoj estas nun restarigitaj sur neformalaj bazoj kaj ili evoluos, post unu aŭ du jaroj, al oficialaj rilatoj.



Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

www.globidar.org

Fondita de teamo de Mondcivitanaj en 1982, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato estas transnacia mutuala asocio, en kiu estas praktikata la kooperan interhelpon inter 1500 membroj el 33 landoj.

En 2006, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato financis :

- ◆ En Burkinio, la konstruadon de nutrosekura vartenejo kaj kooperativon de produkto de fruktosuko ;
- ◆ En Benino : legomejon ;
- ◆ En Togolando : legomejon kaj bovbredejon.
- ◆ Fine : 15 grupoj profitis el mikrokreditoj.

En aŭgusto 2006, la grupoj de membroj de la okcidentafrika regiono, la « Globidaranoj » okazigis la duan Regionan Asembleon en Sokode (Togolando).

La Eŭropa Regiona Asembleo okazos en Parizo la 1an de septembro 2007.

? MSM, pa/APGA, BP 12283, LOME, Togolando

? MSM-Globidar-Francio, 1 ruelle Haute, 21120 Gemeaux, Francio

Se vi deziras ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton, sendu la ĉi-suban formulon plenigitan kaj subskribitan kun la monsumo : 15 € (8 € okaze de malfacilaĵo) al la adreso indikita fine de tiu ĉi bulteno..

"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, plu gardante mian ŝtatanecon, esti registrita kiel **mondcivilano**".

NOMO (per majuskulaj presliteroj)..... FRAŬLINA NOMO

PERSONAJ NOMOJ Profesio

Naskiĝdato Naskiĝloko

Loĝeja adreso

Poŝta adreso (kesto)

Poŝta kodoURBO, Lando :

la (dato kaj subskribo)

- ◆ Laŭeble sendu vian **foton por legitimilo**
- ◆ **Indiku la lingvon** de via legitimkarton :
angla, araba, **Esperanto**, franca, germana,
greka, hispana, itala, japana, nederlanda, portugala,
sveda.

Volontuloj serĉataj !

Ni bezonas tradukantojn en diversajn lingvojn, forum-animantojn, ttt-ejestrojn, tajpantojn, afiŝkreatojn, artistojn, organizantojn de seminarioj kaj prelegoj, korespondantojn, vojaĝantojn, verkantojn, arkivulojn, ktp.

Ĉu vi havas iun tian kompetenton ? Ne hezitu eĉ dum unu sekundo, ekriatu kun ni !

ALVOKO POR KONTRIBUOJ

La Registrolibro de la Mondcivitanoj kontentus se ĉiu Civitano de la Mondo **jare** pagus monsumon egalan al **salajra aŭ enspeza duontago**. Komprenoble pri tiu "memvola mondimpoto" ĉiu mem taksas kiom li povas pagi, konsiderante siajn monrimedojn kaj la monsumojn, kiujn li krome jam pagas por la defendo de la tutmonda komunumo.

KONGRESO DE LA POPOLOJ

ALVOKO AL KANDIDATIĜOJ !



Balotelektoj okazos dum tiu jaro 2007 kaj koncernos 15 elektotojn por naŭjara mandato.

Estas ankoraŭ eble prezenti sian kandidatighon, sed necesas rapide fari tion.

Por kandidatiĝi necesas esti voĉdonanto, do registrita kiel Mondcivitano kaj esti aktiva tutmondisto.

La kandidatiĝoj estas validigitaj de la Balotelekta Kontrolkomisiono, laŭ prezento de negrava dosiero.

Por ĉiuj kompletigaj informoj, oni povas sin adresi al la bulteno, aŭ konsulti la ttt-ejon de Kongreso de la Popoloj :

<http://www.recim.org/kdp/>

Enregistriĝo, abono, memvolaj kontribuoj - aĉetoj

Pagmanieroj :

- Aŭ per ĝiro al la UEA-konto : civi-p.
- Aŭ al CITOYENS DU MONDE
CCP PARIS 2848 94 Y
IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02
Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR
- Ni akceptas la eŭrajn ĉekojn sur francaj bankoj.
- Por la aliaj landoj, preferendas la internacia poŝtmandato, aŭ la interbanka ĝiro inkluzivante la ĉi supran IBAN-kodon
- Ni akceptas la bankajn **monbiletojn** (konverteblajn aŭ ne) enŝovitajn en koloran aŭ karbonan parperon, sub koverto ne registrita.

RECIM-info

Imprimé par nos soins
Le numéro : **2 €** (envoi compris)
Abonnement pour 5 numéros : **10 €**
Tirage : 4300 exemplaires
Comité de rédaction : Daniel Durand, Liliane Metz Krencker.
Directeur de la Publication : Daniel Durand

REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ
asocia sidejo :
66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

Sekretariejo, (librotenado kaj bulteno ...) :
"Les Nids", **FR 49190 ST-AUBIN** (Francio)

Organo konstitua de la monda juro

www.recim.org